

Joseph M. Scriven ,  
 Welch ein Freund ist unser Jesus  
*tradukita de Tr. Ernst Gebhardt*

Welch ein Freund ist unser Jesus,  
 O, wie hoch ist er erhöht!  
 Er hat uns mit Gott versöhnet  
 Und vertritt uns im Gebet.  
 Wer mag sagen und ermessen,  
 Wieviel Heil verloren geht,  
 Wenn wir nicht zu ihm uns wenden  
 Und ihn suchen im Gebet!

Wenn des Feindes Macht uns drohet  
 Und manch Sturmwind um uns weht,  
 Brauchen wir uns nicht zu fürchten,  
 Stehn wir gläubig im Gebet.  
 Da erweist sich Jesu Treue,  
 Wie er uns zur Seite steht,  
 Als ein mächtiger Erretter,  
 Der erhört ein ernst Gebet.

Sind mit Sorgen wir beladen,  
 Sei es frühe oder spät,  
 Hilft uns sicher unser Jesus,  
 Fliehn zu ihm wir im Gebet.  
 Sind von Freunden wir verlassen  
 Und wir gehen ins Gebet,  
 O, so ist uns Jesus alles:  
 König, Priester und Prophet!

...

Joseph M. Scriven ,  
*Ho Jesu', amiko mia*  
*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ho Jesu', amiko mia,  
 Kiel alta estas vi!  
 Estas vi peranto nia,  
 Kiu ligas nin kun Di'.  
 Kiom da aflikto devas  
 Neneceste porti ni,  
 Se preĝante, Lin serĉante  
 Ni ne turnas nin al Li.

Kiam la diablo tentas  
 Nin kun ega energi',  
 Ni ne devas timi ion,  
 Se kredeme preĝas ni.  
 Jen montriĝas la fidelo  
 De Jesu', nin helpas Li,  
 Kiel la Savant' potenca.  
 Tiun preĝe petu ni.

Se ni estas zorgoplenaj  
 Kaj nin premas tio ĉi,  
 Certe helpas nin Jesuo,  
 Niajn pregojn aŭdas Li.  
 Se amikoj vin forlasas,  
 Diru tion nur al Li!  
 Li vin ŝirmos kaj konsolos.  
 Nur al Li vin turnu vi.

...

Joseph M. Scriven ,  
*Trans imag' Jesu' amikas*  
*tradukita de Reinhard Pflüger*

Trans imag' Jesu' amikas -  
 kia la privilegi',  
 ke li portas nian ŝuldon.  
 Preĝe donu ĝin al li.  
 Kiom ni disipas ŝancojn  
 pri anima harmoni',  
 sole ĉar ni rezignadas  
 preĝe turni nin al li.

En danĝero kaj aflikto,  
 tento kaj eĉ tragedi'  
 ni neniam malesperu.  
 Preĝe prenu ĝin al li,  
 la fidela akompano.  
 Amikec' ne eblas pli.  
 Konas li malforton ĉian,  
 preĝe portu ĝin al li.

Zorgoŝargô ofte pezas,  
 kaj senfina la defi'.  
 Ĉion la Savant' superas.  
 Preĝe fuĝu ni al li.  
 Se fortunas sin amikoj,  
 preĝe diru ĝin al li.  
 Vin konsole ĉirkaŭbrakos  
 la Unika sen kopi'.

...

.....  
.....  
.....  
.....  
.....  
.....  
.....  
.....  
.....  
.....

*Traduko de la Angla poemo “What a Friend We Have in Jesus” de JOSEPH M. SCRIVEN (\*1820 – †1886) en la Germanan de TR. ERNST GEBHARDT (\*1832 – †1899).*

Arg-372-729 (2006-08-24 09:35:25)

*Tiun ĉi germanan tradukon mi trovis en la interreto en / Diese Übersetzung ins Deutsche fand ich unter: [“http://ingeb.org/spiritua/whatafri.html”](http://ingeb.org/spiritua/whatafri.html).*

Ho Savanto, Vi promesis,  
Ke Vi portos ja por ni  
Niajn ŝarĝojn, ni do portu  
Ĉion preĝe nur al vi.  
Baldaŭ ni ne devos pregi  
Plu sur tiu Tero ĉi,  
Tie ni senfine gloros  
Vin en eterneco’, ho Di’.

*Traduko de la Angla poemo “What a Friend We Have in Jesus” de JOSEPH M. SCRIVEN (\*1820 – †1886) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2006-08-24.*

MR-449-1b / Arg-372-727 (2006-08-24 09:22:30)

Vi, Savant’, promesis porti  
ŝarĝojn niajn tie ĉi.  
Tial ilin ni demetu  
ĉiujn preĝe nur ĉe vi.  
Baldaŭ pregoj ne necesos  
ĉe la brila tron’ de Di’.  
Ĝis etern’ ni restos rave  
en ador’ kaj laŭd’ al Li.

*Traduko de la Angla poemo “What a Friend We Have in Jesus” de JOSEPH M. SCRIVEN (\*1820 – †1886) en Esperanton de Reinhard Pflüger en 2006-08.*

Arg-372-732 (2008-03-30 23:14:41)

*Tiu ĉi Esperantigo aperis en la numero 4/2006 de la organo de Kristana Esperanto-Ligo (KE-LI), en Aŭgusto de 2006.*